

Jara abono 1973

20,- GM



PILO-PRESS

Internacia Inform servo

† N-ro 39/72 - 5 dec 1972



DAS MÜNSTER AM HELLWEG

Mitteilungsblatt des Vereins für die Erhaltung
des Essener Münsters (Münsterbauverein e. V.)

Bezugspreis ist im Mitgliederbeitrag enthalten (VKZ) 1 H 21 383 E

25. Jahrgang

Juli 1972

Heft 7

Wilhelm Heinrich Trompeter

(* 22. Januar 1839, † 7. November 1901) aus Essen,
ein Mäzen des Esperanto

Von Adolph Holzhaus, USA

Im Jahre 1971 erschien in Tel Aviv in Esperanto eine Biographie über Wilhelm Heinrich Trompeter, einen Markscheider. Verfasser ist Adolf Holzhaus, der im Gouvernement Suwalki, Westrußland, geboren ist und heute im Staate Indiana, USA, lebt. Da Trompeter aus Essen stammt, hat Adolf Holzhaus für seine Schrift wiederholt die Hilfe des Stadtarchivs Essen in Anspruch genommen und wurde von dem Unterzeichneten gebeten, eine zusammenfassende Darstellung der Persönlichkeit Trompeters für das Münster am Hellweg zu schreiben, damit auch die Leser, die des Esperantos nicht mächtig sind, die Neuerscheinung kennenlernen. Der Aufsatz von Adolf Holzhaus, der die deutsche Sprache nicht vollständig beherrscht, wurde auf seinen Wunsch überarbeitet.

Schröter

Eldonanto/Herausgeber:

Pöck. Ludwig
Pickel, Nürnberg

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 81956-851

Pri Wilhelm Heinrich
Trompeter en germana
revuo

Essen (PP) En la bul-
teno "Das Münster am
Hellweg", organo de la
societo por la konser-
vado de la katedralo
de Essen, n-ro julio 72,
aperis 10-paĝa german-
lingva artikolo pri la
vivo kaj agado por-espe-
ranta de la germana Es-
peranto-pioniro Wilhelm
Heinrich Trompeter. En la
bulteno estas publikigita
ankaŭ la foto de Trompeter
kaj kopiò de la titolpa-
ĝo de Esperanto-lerno-
libro verkita de W.H.
Trompeter en la jaro 1891.
(Vidu maldekstre!)

La enkonduko al la artikolo de urba
arkivdirektoro Dr. Hermann Schröter,
Essen, tekstas en E-traduko jene:

"En la jaro 1971 aperis en Tel Aviv
en Esperanto biografio pri Wilhelm
Heinrich Trompeter, "Markscheider"
(minista inĝeniero). Aŭtoro estas Adolf
Holzhaus, kiu naskiĝis en la distrikto
Suwalki, Okcidenta Rusujo, kaj kiu ho-
diaŭ vivas en la ŝtato Indiana, Usono.
Ĉar Trompeter devenas el Essen, Adolf
Holzhaus ripete petis la helpon de la
urba arkivo Essen, kaj li estis petita
de la subskribinto, skribi resuman pri-
skribon de la personeco Trompeter por
la Münster am Hellweg, por ke ankaŭ
la legantoj, kiuj ne scipovas Esperan-
ton, konatigu la novaperaĵo. La eseo
de Adolf Holzhaus, kiu ne perfekte re-
gas la germana lingvon, estis prilabo-
rita laŭ lia deziro. Schröter"

Tiu eseo denove estas bona ekzemplo de
internacia kunlaboro inter esperanti-
sto kaj nacia institucio. Per ĝi la
Trompeter-biografio Holzhaus vastigis
la scion pri la E-pioniro Trompeter
al ne-esperantista medio.

Die Weltsprache

„ESPERANTO“

Vollständiges Lehrbuch

nebst zwei Wörterbüchern,

nach der russischen Ausgabe von

Dr. L. Samenhof

herausgegeben von W. H. Trompeter.

Preis 20 Pfennige.

Commissions-Verlag von **Rudolf Uhlig, Leipzig.**

NÜRNBERG 1891.

W. Tummel's Buch- u. Kunstdruckerei.

Efika informado

Kronach (PP) Jam ofte ni havis okazon ĉi-loke raporti pri efika kaj celkonscia agado de la Esperanto-rondo Kronach. Ĉi-foje ni povas mencii artikolojn pri Esperantaj temoj en la loka gazetaro, Neue Presse kaj Fränkischer Tag.

La 11 resp 14 de nov 72 aperis artikoloj pri la temo "La lingvoproblemo de niaj gastlaboristoj", kaj la 25 de nov ambaŭ gazetoj publikigis artikolon pri Esperanto kaj Eŭropo sub la titolo " Esperanto sekurigus Eŭropon".

Ĉiuj artikoloj aperis sekve de koncernaj prelegoj de W. Walther dum la Esperanto-kurso ĉe la popolalternejo. La gazetoj jam antaŭanoncis referaĵon pri la opinio de la mortinta rusa sciencisto E.A. Bokarev pri Esperanto.

50 marvojaĝoj de m/s "Zamenhof"

Varsovio (PR-md) La pola 10-mil tonela ŝipo m/s "Zamenhof" finis ĉi-aŭtune sian 50-an marvojaĝon laŭ la trako Gdynia - Malproksima Oriento. La ŝipo, kiu estas en la servo de la Ĉina-Pola Kompanio de Ŝip-Makleristoj, vojaĝas kun kargo al havenoj de Ĉina Popola Respubliko kaj al havenoj de la pacifika marbordo de Sovetunio. La ŝipanaro havas kontaktojn kun polaj esperantistoj, kiuj "patronas" al la ŝipo "Zamenhof". Donacoj de polaj esperantistoj troviĝas en la kulturdomo kaj domo de maristo en la soveta haveno Poronajsk.

Sesdek jarojn Diservo en Esperanto

Londono (ps-IF) Dimanĉon, la okan de oktobro 1972, la "Esperanto Diservo en Londono" celebris sian sesdekan datrevenon. Fondita en 1912, de la bonkonata esperantisto Montagu Butler, la ĉiumonataj Diservoj okazis preskaŭ senĉese post tiu dato. Unue oni uzis privatan donon, sed nuntempe gastigas ĝin la Franca Protestanta Preĝejo en Soho. La specialan Diservon en oktobro gvidis la nuna sekretario, s-ro A.D. Debenham.

Torento-Trilogio - Novaj DEF-libroj

Jus atingis nin du novaj E-libroj de la diligenta kaj sukcesa Dana Esperanto-Eldonejo:


Junuloj en Torento de Stellan Engholm, 14 x 19,5 cm, 144 paĝoj, broŝ. prezo 9,50 DM.

Fakte tiu libro estas la dua parto de "Infanoj en Torento", kiu reaperis antaŭ kelkaj semajnoj. Sed en interkonsento kun s-rino Olga Engholm oni donis al ĝi propran titolon, por eviti konfuzon. La tria parto de la Torento-serio nomiĝas Vivo vokas, kiu estas eldonita de Eldona Societo Esperanto en Svedio.

Kit vivas de Jytte Lyngbirk en Esperanto-traduko de Gudrun Riisberg, 14,3 x 20,8 cm, 92 paĝoj, broŝ., prezo 12,80 GM

Tiu dana libro kondukas la leganton tra la diversaj medioj, kie vivas la moderna junularo. La 17-jara Kit venis en rondon de haŝiŝo-fumantoj kaj en senesperansituacion, el kiu savas ŝin Fen...

NA PLACU ZAMKOWYM



Konstruloko de la "Reĝa Kastelo" en Varsovio dum novembro 1972 (foto el Trybuna Ludu 26.11.72)

La kampanjo "Internacia Esperanto - Solidareco", fonduso por la Rekonstruo de la Reĝa Kastelo en Varsovio daŭras. Donacojn oni sendu aŭ rekte al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Varsovio, aŭ al Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113, pĉk. Nürnberg 2144 96-855 aŭ Stadtparkasse Nürnberg 1.960.149. La donacojn oni mencias en la Esperanto-elsendoj de Pola Radio!

Televizja NRF nadaĵa w „Tygodniu Polskim” zestaw audycji o Polsce, w których nie zabrakło akcentów esperanckich. Nadano bowiem m. in. fragment filmu „Nie lubię poniedziałku”, w którym redaktor audycji esperanckiej Polskiego Radia Andrzej Pettyn na lotnisku warszawskim Okęcie wita przedstawiciela Włoch po esperancku. W rękę trzyma dwutygodnik „Heroldo de Esperanto”.

Audycje Telewizji NRF o Polsce zostały również zrecenzjowane przez Esperancką Agencję Prasową „Pilo-Press”. Recenzent konczy swą recenzję słowami: „Ja także nie lubię poniedziałku, ale lubię Warszawę i esperanto”.

La pollingva gazeto "Ilustrowany Kurier Polski" regule raportas pri Pilo-Press aŭ publikigas informojn en pola lingvo el Pilo-Press.

La supra informo kun la titolo "FRG Televido kaj Esperanto" pri la siatempa "Pola Semajno" en la dua programo ZDF kun la filmo "Mi ne ŝatas lundojn". Je la fino de la informo oni represas la Pilo-Press-deklaron: "Ankaŭ mi ne ŝatas lundojn, sed mi amas Varsovion kaj Esperanton."

Nova Konkurso de la Pola Radio

10tagaj ekskursoj tra Pollando — Multaj premioj kaj suveniroj

Atenton, ĝesinjoroj! Pola Radio anoncas novan konkurson por ŝiaj eksterlandaj aŭskultantoj. La aŭskultantojn, kiuj partoprenos la konkurson, atendas multaj premioj kaj suveniroj. Inter la ĉefpremioj troviĝas 10-tagaj ekskursoj tra Pollando.

Por partopreni la konkurson, kaj sekve por partopreni la lotadon de la premioj, oni devas respondi almenaŭ al unu el la jenaj demandoj:

1. Kion — laŭ via opinio — oni devas entrepreni por ankoraŭ pli vaste disvolvi la internacian pacan kunlaboron?
2. Kiuj eventoj — laŭ via opinio — tute aparte kontribuis al la evoluo de la kunlaboro inter Pollando kaj via lando?
3. En kiu sfero — laŭ via opinio — ekzistas la plej grandaj ebloj por plivastigi la kunlaboron de ambaŭ niaj landoj?

La respondojn oni devas sendi al la adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O. Box 46, Warszawa 1, Pollando, en kovertoj signitaj per la atentigo „Konkurso”, ĝis la 31a de decembro 1972 (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultoj de la konkurso estos anoncigitaj la 31an de januaro 1973. La ekskurso de la laureatoj de la ĉefpremioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni kredas, ke pro la fakto, ke la temoj de la paca internacia kunlaboro estas aparte proksimaj al la esperantistoj kaj kongruas kun la ideoj de la Esperanto-movado, vi partoprenos nian konkurson amase kaj vaste diskonigos ĝin inter viaj konatoj kaj leteramikoj.

Ni deziras al vi bonŝancon en la lotado de la premioj!

Esperanto-Redakcio de la Pola Radio

Beogradaj novaĵoj

Rotterdam (UEA) Ĵus aperis la dua numero de la UK-informilo, el kiu ni citas jenajn informojn:

Belartaj konkursoj

Jam tradicie oni invitas ĉiujn membrojn de UEA kaj kongresanojn, kiuj volas provi sian talenton en belartaj branĉoj (poezio, prozo, teatro-verko) konkursi sub la aŭspicio de UEA kaj gajni premiojn. Konkursemuloj kontaktu la sekretariinon, s-inon Emilija Lapenna, Nova Ves 32/III YU-41000 Zagreb, Jugoslavio antaŭ la limdato 31.3.1973.

Denove Kanto-vespero

La granda sukceso de la kanto-vespero en Londono 1971 instigis la kongresorganizantojn denove enprogramigi "Vesperon de Esperanta Kanto kaj Fanzono" dum la beograda kongreso. Ĉiuj kantistoj, kiuj havas en sia repertuaro kantojn aŭ kanzonojn en Esperanto (originalajn aŭ tradukitajn) estas invitataj skribi al la konstanta adreso de la kongreso.

Fervoja rabato

Kiel partoprenanto en la internacia konvencio, Jugoslavio asignas 25%-an rabaton por vojaĝantoj al internaciaj kongresoj je aĉeto de ir-revena fervoja bileto.

Profitu la rabatitan kongreskotizon ĝis la 31.12.72. Aliĝu jam nun al la kongreso. Informojn donas Pilo-Press! Ĝis la 30.11.72 aliĝis 287 personoj el 33 landoj!

La semajno en la radio

Jam ofte ni povis informi, ke gazetoj kaj radiostacioj utiligis Pilo-Press-informojn, speciale la germanlingvan eldonon. Antaŭ kelkaj tagoj alvokis raportisto de Bavara Radio, studio Nürnberg, kaj danke konfirmis la ricevadon de la germana Pilo-Press-eldono. Li klarigis ankaŭ la radian principon, laŭ kiu informoj povas esti utiligataj. Li akcentis, ke la radio devas disaŭdigi informon minimume unu tagon pli frue ol ĝi estas publikigita en la gasetaro. Li do petis sendi la Pilo-Press-eldonon 1 tagon pli frue ol ĝin ricevas la gazetoj. Same li petis pri ekskluzivaj informoj pri la Hamburga Universala Kongreso kaj pri la Luksemburga Esperanto-Kongreso 1973.

El la lunda Esperanto-Ekspreso de Radio - Varsovio ni eksciis pri "cerbumkomitato" ĉe Pola Esperanto-Asocio kaj pri la restado de d-ro Hans Eichhorn, Detlev Blanke (GDR) kaj f-ino F. Szabó, Hungario, en Moskvo. Rememorojn kongresajn vekis la ekstrakta parolado de prof. Waringhien pri Plena Ilustrita Vortaro. - Bedaŭrinde la posttagmeza programo de Radio Varsovio ĉi tie ne ĉiam estas kaptetbla bone, ekz. la dimanĉa E-Ekspreso entute ne aŭdiĝis, same kiel ne en Munkeno. Ankaŭ Romo denove ne estis aŭdebla! Ĉu la radiaj teknikistoj ne povas helpi? Aŭ nur kulpaŝ la atmosfero? Berno, Zagrebo kaj Pekino kutime bone aŭdeblas!